

Literatura Mondo, 12-a parto:
La Plena Gramatiko de Esperanto kaj ties Antaŭparolo
de Gaston Waringhien kaj Kolomano Kalocsay
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 638, 1975.12.31 & 1976.01.03

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La kvaronjara organo *Lingvo – Libro*, bibliografia kaj recenza suplemento al *Literatura Mondo*, anoncis en 1935 la baldaŭan aperon de la libro *Plena Gramatiko de Esperanto* publikigante ties *Antaŭparolon*. En ĝi *Gaston Waringhien* kaj *Kolomano Kalocsay* tiel priskribas sian kompleksan laboron :

A.- « *Ni, antaŭ ĉio, studis kaj reduktis al reguloj la uzadon de Zamenhof, kaj de la bonaj klasikaj verkistoj. Sed en tiu materialo, kiel ajn vasta ĝi estas, kelkaj punktoj restis, aŭ dubaj, aŭ eĉ tute ignorataj : ni provis ŝtopi ankaŭ tiujn breĉojn. Por tio, ni helpis al ni kaj per la hodiaŭ montriĝantaj tendencoj de la lingvo, kaj per la ĝeneralaj kutimoj de la eŭropaj lingvoj, kaj fine per la abstrakta logiko. Ni klasas tiujn kriteriojn laŭ malkreska ordo de valoro. [...]* »

Cl.- Pri la ŝtopitaj breĉoj ili pliposte diras :

A.- « *Ni parolis supre pri breĉoj ŝtopitaj. Tiaj lokoj, vere, ne estas multaj en la libro ; plejparte ni tenis nin al la principo **konstati, ne proponi**. Kie ni malobeis tiun principon, tie ni markis tion, dirante aparte, ke temas pri propono (por tio sin proponas, oni povus uzi, estus oportune uzi ktp.), krome tiaj lokoj estas lokitaj en piednotoj aŭ presitaj per petitaj literoj. Per tia averto ni volis garantii, ke la libro, kvankam en ĝi ne mankas ankaŭ nemalhaveblaj proponoj, estu tamen fideinde **oficiala**.* »

Cl.- Tiuj ĉi citaĵoj montras, ke Waringhien kaj Kalocsay konsciis, ke samtempe ili devis priskribi la zamenhofan lingvon, sed ke kelkfoje estis necese preskribi regulojn. Baldaŭ donjarcento disvolviĝis post la apero de la epokfara *Plena Gramatiko de Esperanto*. Bedaŭrinde neniu serioza kritika studo pri tiu ĉi verko publikiĝis ĝis nun. Tamen ne estas la studtemoj, kiuj mankas. Estus interese kaj verŝajne tre instruige analizi, kiuj gramatikaj punktoj restis neesploritaj en la jaroj tridekaj, kaj ĉu la de Waringhien kaj Kalocsay proponitaj reguloj vere kongruas kun la latentaj tendencoj de esperanto, aŭ nur kun tendencoj propraj al la beletra uzantaro. Oni ankaŭ povas sin demandi, ĉu limigi sian observadon al la ĝeneralaj kutimoj de la eŭropaj lingvoj estas pravigebla, kiam oni interesiĝas pri la priskribo de esperanto. Spirite esperanto ne ĉiam estas tre eŭropeca. Tamen ni opinias, ke ĉiuj seriozaj studoj, kiujn oni foje publikigos pri la rolo de Waringhien kaj Kalocsay, demonstros, ke tiuj du gramatikistoj havis tre pozitivan influon. Ilia verko *Plena Gramatiko de Esperanto* levis la lingvajn kaj gramatikajn debatojn ĝis nivelo neniam atingita antaŭe. Kaj se oni komparas ĝin, kun la eseoj antaŭe publikigitaj, oni tuj konstatas la enorman diferencon, kiu ekzistas inter ĝi kaj ili. *Plena Gramatiko de Esperanto* estas lingva kaj literatura monumento, kiu metis esperanton je evolua ŝtupo, kiun neniu alia planita lingvo atingis.

A.- Alia studobjekto povus esti la psikologia rezisto al la *Plena Gramatiko*. En esperantio ekzistas multaj homoj, kiuj havas tre supraĵan komprenon pri la lingvo al ili tiel kara. Ili malfacile akceptas, ke la zamenhofa idiomato emancipiĝis el la 16-regula gramatiketo, kiu estis ĝia lulilo. Ju pli fuŝparola estas ilia lingvo-sinteno, des pli pasia estas ilia kontraŭstaro al la laboro de Waringhien kaj Kalocsay. Kaj la lukto ne finiĝis.

Cl.- En la komenco de sia antaŭparolo Kalocsay kaj Waringhien aludas tiun ĉi problemon:

A.- « *La unua sento, kiu verŝajne atakos la leganton ĉe la ekrigardo al tiu ĉi libro, estos la timo, kaj lia unua penso – amara bedaŭro pri la liliputa 16-regula gramatiketo de 1888. Li konsoliĝu pensante, ke ankaŭ li mem ne povus survesti sian unuajaran pantaloneton, kaj ke tiu ampleksiĝo de la gramatiko nenion alian signifas krom evoluo kaj kresko de la lingvo. Kaj pri tiu punkto, ni esperas, oni povas nur ĝoji. Dua senkulpigo : lingvo estas tre vasta kaj kompleksa mekanismo. Estus facile sistemigi ĝin per kelkaj tre ĝeneralaj trajtoj, aperigi ĝiajn ĉefliniojn. Sed se oni vere volas studi ĝin detale, prezenti respondon al ĉiuj etaj demandoj, kiujn je ĉiu fraz-angulo metas la milforma, ĉiamvaria homa penso, estas necese verki iom pli kompaktan libron. Tria, oni devas memori, ke nian internacian lingvon uzas ne animkonsistaj anĝeloj, sed enkorpiĝintaj homoj : ili ĉiuj havas en sia spirito, profunde gravuritajn, la kutimojn, apartaĵojn, idiotismojn de sia patrina lingvo. Ne estas facile al ili **formeti la malnovan homon kun liaj agoj**, fremdigi al sia penso tiel ofte iritajn vojojn kaj vojstrekojn. Oni devas kalkuli kun tiuj naciismoj, kribri ilin, akcepti tiujn, kiuj estas ĝenerale uzataj kaj ne tro pikas la logikon, forpuŝi la aliajn – kaj tiun disjuĝon oni ne povas fari sen granda detalado. Tiel oni povas argumenti, ke en nia gramatiko la malfaciloj venas ne de Esperanto mem, se de la naciaj lingvoj. »*

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!